

La 7an de Oktobro, 2011

Deklaro de la 64a ĉiujara konferenco de UN DPI/NRO
Bonn, Germanujo, 3a ĝis 5a de Septembro, 2011

Prezentita al la Ĝenerala Asembleo de UN: A/66/750

Daŭropovaj socioj; Respondecaj civitanoj

Enkonduko

La partoprenantoj de la 64a ĉiujara konferenco de UN DPI/Ne-Registaraj Organizaĵoj, kunveninta de la 3a ĝis la 5a de Septembro 2011 en Bonno, Germanujo, sidejo de UNaj organizaĵoj kaj kongresoj laborantaj super daŭrigebla evoluigo tutmonde kaj hejme por interdisciplina aro da neregistaraj organizaĵoj kaj institucioj laborantaj en la kampoj de volontulismo, medio kaj evoluigo;

Rimarkigante ke la 64a ĉiujara konferenco de UN DPI/NRO estas ĉefa evento de koncernatoj celanta kontribui al la du kunsidoj atentantaj la volontulecon de la UNa Ĝenerala Asembleo, planitaj je 5a de Decembro 2011 en Nov-Jorko honore al la 10a datreveno de la Internacia Jaro de Volontuloj;

Plue rimarkigante ke la 64a ĉiujara konferenco de UN DPI/NRO ankaŭ celas informi la preparan procedon al UNa Konferenco pri daŭrigebla evoluigo (Rio+20) en Rio de Janeiro, de la 4a ĝis la 6a de Junio 2012;

Memorante la celon de la Tuttera Pintokunveno (Rio+20) komisiita de Rezolucio A/64/236 de la UNa Ĝenerala Asembleo, por certigi renovigitan politikan sindevontigon al daŭrigebla evoluigo, taksu la ĝisnunan progreson kaj la restantajn mankojn en la efektivigo de la rezultoj de la ĉefa pintokunveno pri daŭrigebla evoluigo kaj trakti novajn kaj novaperintajn defiojn, kiuj inkluzivas la temojn de verda ekonomio en la kunteksto de elimino de malriĉo kaj daŭrigebla evoluigo kaj la institucia kadro por daŭrigebla evoluigo;

Konsciante la malsukceson de ŝtatoj sekve trakti la urĝecon sciigitan en la malferma alineo de Agendo 21:

- la homaro aktuale staras ĉe difina momento en la homa historio. Ni alfrontas daŭrigon de malegalecoj inter landoj, kaj plia malboniĝo de malriĉo, malsato, malsaneco kaj skribmalklereco kaj la daŭra difektiĝo de la ekologia sistemo, de kiu ni dependas por nia bonfarto; (Agendo 21, UNCED, 1992)

Notante la neceson reaserti kaj renovigi Agendon 21, kiu, en sekcio 3.7, emfazas, ke daŭrigebla evoluigo estu atingata ĉe ĉiu nivelo de la socio kaj ke registaroj, kunlabore kun konvenaj internaciaj kaj neregistaraj organizaĵoj, aprobu komune konsentitan pritrakton de daŭrigeblo;

Agnoskante ke la forto de daŭrigebla evoluigo estas ties esenca naturo interligi problemojn kaj solvojn trans larĝa spektro de problemaroj;

Gvidite de la dokumentoj rezultintaj de la ĉefaj tutmondaj pintokunvenoj en la

1980aj kaj la 1990aj jaroj, Agendo 21 kaj la Deklaro de Rio, la Johanesburga plano pri efektivigo de la tutmonda pintokunveno pri daŭrigebla evoluigo en 2002, kaj la popola interkonsento de Koĉabambo;

Memorigante ke la Tera Ĉarto kune kun la Kulturo de Paco povas ludi decidan rolon helpante inspiri renovigitan politikan sindevontigon atenditan por Rio+20 kaj gvidi la transiron al daŭrigebla, justa kaj paca socio kun respekto kaj zorgo por la tuta vivokomunumo;

Memorigante pri la Deklaro en Rio pri Naturmedio kaj Evoluigo, precipe principo 10, pri la neceso certigi partoprenon de ĉiuj koncernataj civitanoj en ekologia decidofarado kaj ankaŭ aliron al ekologiaj informoj kaj ekologia justeco kaj principoj 20-22 pri la neceso antaŭenigi partoprenon de virinoj, junularo, kaj indiĝenaj popoloj;

Rekonfirmante la gravecon atingi la celojn fiksitajn en la Internacia Konferenco pri Loĝantaro kaj Evoluigo, la kvara monda konferenco pri virinoj, kaj la Jarmilaj Evoluigaj Celoj de UN;

Plie gvidata de la Resolucio 63/153 de la 18a de decembro 2008 de la Ĝenerala Asembleo invitante registarojn kaj aliajn koncernatojn organizi aktivecojn fokusitaj al la dekjariĝo de la Internacia Jaro de Volontula Engaĝiĝo;

Memorante ke la Ĝenerala Asembleo, en paragrafo 16 de tiu verko, A/RES/63/153, petas la UNan Ĝeneralan Sekretarion raporti al la Ĝenerala Asembleo ĉe ties sesdeksepa kunsido pri la efektivigo de la deka datreveno de la Internacia Jaro sub la punkto kun la titolo Socia evoluigo, kaj esti sekvata de la UNa Volontula programo, ties partneroj kaj la aliaj tiutemaj partoj de la UNa sistemo;

Konscie pri la neceso plutrakti post la Internacia Jaro de Volontula Engaĝiĝo de 2011 kaj notante, ke la kreita impeto kontribuis al pliiĝo de la moviĝo de volontulismo tutlande, regione kaj tutmonde kun partopreno de pluraj registaroj, pluraj civilsociaj organizaĵoj, pluraj privatsektoraj partneroj, kaj pluraj homoj el pli vasta parto de asocioj;

ĜENERALAJ DEKLAROJ

Agnoskante ke homoj rajtas je sana kaj produktiva vivo en harmonio kun la naturo.

Alarmite de la pliiĝanta perdo de biologia diverseco; la indico de dezertiĝo, senarbiĝo, precipe en la tropiklandoj kaj arbara degenerado tutmonda; la disfalo de fiŝkaptaj rimedoj, kaj la pligraviĝintaj efikoj rezultantaj de tutmonda varmiĝo;

Agnoskante ke biologia diverseco kaj lingva diverseco estas neapartigeblaj, kaj alarmite de la perdo de tradicia scio pro la perdo de lingva diverseco;

Maltrankviligite de klimatsanĝiĝo kaj ties efikoj inkluzivantaj pliiĝantan perdon de biologia diverseco kaj ankaŭ acidiĝo de oceanoj kaj la disfalo de glaciejoj, glacikovraĵoj kaj polusaj glaciomasoj;

Agnoskante ke miliardoj da homoj vivas en malriĉo, kaj ke malriĉo ofte trafas virinojn;

Agnoskante ankaŭ la mankon de konstantaj kaj daŭrigeblaj energifontoj por la evoluantaj kaj la evoluantaj landoj, la nedaŭrigeblan agrikulturon, kaj altiĝojn de prezoj por nutraĵoj;

Konstatante la interrilatojn inter la ekologiaj defioj, klimatsanĝiĝo, nutraĵokrizo kaj mona kaj financa malstabileco, pligravigata de la senprecedenca koncentriĝo de financaj rimedoj kaj evidentaj malegalecoj inter homoj;

Notante ke solvoj surbaze de malreguligitaj merkatoj pligravigis la problemojn kaj estigis sekvojn malfavorajn por la homaro; kaj ke sindevontigoj pri financado por evoluigo ne estas plenumitaj;

Agnoskante ankaŭ ke la aktuala mona, financa, komerca kaj ekonomia sistemoj kune kun neegalaj potencrilatoj estas la ĉefaj instigiloj por la aktiva procezo de ekologia, morala kaj spirita malriĉiĝo;

Agnoskante ke paco, antaŭenigo de packulturo kaj respekto por homaj rajtoj estas konsistigaj elementoj por daŭrigebla evoluigo, kaj ke la grandaj elspezoj destinataj al militado kaj militistaj aktivaĵoj, interalie esplorado precipe por la uzo de atomarmiloj, reprezentas gravan minacon al la planedo influantan la homan vivon ĉie, kaj prezentantan neakcepteblajn riskojn, precipe postlasadon de atomaj rubaĵoj kaj ekspluatadon de uranio sur la sanktaj grundoj de indiĝenaj popoloj, kaj eventuala difektiĝo de nukleaj reaktoroj kaŭzita de naturaj kaj homfaritaj riskoj;

Alvokas la membroŝtatojn de UN kaj ĉiujn koncernatojn tuj ekagi en traktado de la alarma krizo kaj malsatego en la Korno de Afriko;

Agnoskante ke daŭrigebla evoluigo kiel ilo por certigi homan bonfarton necesigas, ke interrilatoj inter loĝantaro, rimedoj, la medio kaj evoluigo devus esti plene komprenataj, agnoskitaj, konvene administrataj kaj metataj en harmonian, dinamikan ekvilibron, ŝtatoj antaŭenigu taŭgajn politikojn inkluzivante loĝantarorilatajn politikojn, inkluzive de lingvopolitikoj, por plenumi la bezonojn de nunaj kaj estontaj generacioj sen kompromisi la eblecon de estontaj generacioj plenumi siajn proprajn bezonojn;

Agnoskante, ke la reĝimo de internacie konsentitaj evoluigaj celoj estas la fundamento por daŭrigebla evoluigo, kaj ke la nunaj komercaj praktikoj kaj politikoj devus ne esti akceptataj;

Reliefigante la bezonon sinpovigi la junularon pere de formala kaj neformala edukado pri daŭrigebla evoluigo, kaj ankaŭ per partopreno je ĉiuj niveloj kaj en ĉiuj stadioj de decidofaradaj procedoj;

Agnoskante la gravan rolon de formala, neformala, malformala kaj metia lernado kaj dumviva edukado por daŭrigebla evoluigo;

Agnoskante sinergiojn kaj interrilatojn inter seksa egalrajteco kaj daŭrigebla evoluigo, la gravecon de knabina kaj virina partopreno en decidofarado pri procedoj

por daŭrigebla evoluigo kaj direktado je ĉiuj niveloj, kaj ilian rolon kiel agantoj por ŝanĝo; kaj la neceson certigi ilian plenan kontribuon por konstrui verdajn ekonomiojn kaj daŭrigeblajn sociojn;

Devontigante sin al antaŭenigo de respekto por kultura, lingva kaj etna diverseco kaj faciligo de solidareco kaj reciprokeco inter popoloj, inkluzive de indiĝenaj popoloj kaj nacioj kaj alianco kaj partnereco inter civilizacioj;

Konsciante la gravan rolon, kiun ludas la amaskomunikiloj kaj modernaj komunikiloj en la plialtigo de konscio kaj faciligo de kunlaborado, antaŭenigante daŭrigeblan konduton kaj evoluigante sud-al-sudajn novaĵo-diskonigajn mekanismojn;

Agnoskante ke homoj kaj naturo interdependas, kaj ke la tutmondaj komunaĵoj - ekzemple la aero kaj oceanoj, estas resursoj, de kiuj ni ĉiuj dependas, ni instigas komunumojn, registarojn kaj aliajn koncernatojn estri kaj dividi la respondecon de decidofarado pri sekurigado kaj pliiĝado de la fruktoj de naturo kaj socio, kiuj estigas la fundamenton de verda ekonomio;

Agnoskante ankaŭ ke biologia diverseco kaj lingva diverseco estas neapartigeblaj, interligitaj kaj interdependaj, kaj alarmite pro la pliiĝanta perdo de lingva diverseco kaŭzanta perdon de tradicia scio, kiu estas esenca por daŭrigado de biologia diverseco;

Agnoskante plie ke la efektivigo de la agoprogramo por daŭrigebla evoluigo necesigas krom fortaj politikaj agoj kaj politika estrado la ĉiutagajn, volontulajn agadojn de milionoj da homoj kaj la civilsociaj organizaĵoj tutmonde;

Agnoskante kaj plibonigante la efikon de volontuleco por adapto al kaj mildigo de klimatŝanĝiĝo, kaj por la evoluigo de daŭrigeblaj vivtenoj, memorigante la longan historion de volontula sindevigo en ekologiaj aferoj, gravos agnoski, ke la rolo de civitana sindevontigo kaj volontula agado eĉ pligraviĝas en la certigado de ekologie daŭrigebla estonteco kaj verda ekonomio en la kunteksto de daŭrigebla evoluigo kaj elimino de malriĉeco, precipe kiel ni alproksimiĝas al Rio+20;

Agnoskante la rolon de volontulismo por atingi daŭrigeblajn sociojn per faciligo de socia inkluzivo kaj kiel ilo por okupi kaj utiligi ĉiujn segmentojn de la socio, inkluzive de virinoj, infanoj, junuloj, maljunuloj, kripluloj, indiĝenaj gentoj, malplimulto, migrantoj, kaj tiuj ekskluditaj kaj senŝirmaj pro sociaj, lingvaj aŭ ekonomiaj kialoj;

Agnoskante ke volontulismo, kiel speco de neformala edukado, proponas ŝancojn al gejunuloj preni respondecon pri sia vivteno, akiri kapablojn kaj kompetentojn kaj agi kiel pozitivaj imitinduloj por aliaj junuloj;

Rekonfirmante ke volontulismo estas grava elemento de ajna strategio celanta mobilizi komunumojn al atingo de la Jarmilaj Evoluigaj Celoj de UN, aparte de elimino de malriĉeco, komunumocentra daŭrigebla evoluigo, sano, inkluzive de seksa kaj reproduktiĝa sano, redukto de katastrofa risko, administrado de postkatastrofa restarigo kaj interpaco;

Agnoskante ke volontulismo, en la centra pozicio por inspiri la tutmondan evoluigan dialogon, gvidu la penojn de ĉiuj koncernatoj por evoluigi kundividitan vizion de

partnereco por la kresko de la tutmondaj komunaĵoj en aferoj, kia edukado, kaj ĉe la etnivelo en familioj kaj ĉe la nacia nivelo, junulara aktivismo per la artoj kaj per enreta ĵurnalismo, kaj per novigaj, daŭraj metodoj de mem-organizado kaj kolektiva agado, kiuj devus esti dokumentitaj kaj antaŭenigitaj per konvenaj tutmondaj informosistemoj;

Reliefigante la kernan kontribuon de volontulado en postkonfliktaj kunteksto por konstrui daŭrigeblajn sociojn per rekonstruo de institucioj, loka kapacito, kaj socia kohereco per diversaj formoj de volontulado;

La Neregistaraj Organizaĵoj ĉeestantaj ĉi tie en Bonno, Germanujo, je la 5a de Septembro, 2011, deklaras la jenon pri la aferoj de verda ekonomio en la kunteksto de elimino de malriĉo, daŭrigeblaj vivmanieroj, edukado kaj dumviva lernado por daŭrigebla evoluigo, civitana sindevontigo en estrado de daŭrigebla evoluigo kaj volontulismo:

Rio+20 kaj Civitana Engaĝiĝo

Ni alvokas registarojn adopti la celojn de daŭrigebla evoluigo detalitajn ĉi-sube;

Ni instigas ĉiujn koncernatojn implikiĝi en Rio+20 kaj fari siajn proprajn sindevontigojn por daŭrigebla evoluigo;

Ni alvokas registarojn:

- veni al Rio+20 reprezentate de ŝtatestroj aŭ registarestroj, kun konkretaj sindevontigoj entrepreni individuajn kaj kolektivajn agojn por daŭrigebla evoluigo kaj trakti mankojn kaj aperantajn aferojn, surbaze de la principo de komunaj sed diferencigitaj respondecoj;

- verki politike ligan rezultan dokumenton, kiu devigas registarojn atingi daŭrigeblan evoluigon;

- estigi aldonaĵon al la rezulta dokumento enhavante sindevontigojn de la landoj por formi la fundamenton de tutmonda registrado de daŭrigeblecaj agadoj kaj sindevontigoj de ĉefaj koncernatoj, kiuj inkluzivas severajn kontroladajn kaj raportadajn kondiĉojn;

Ni alvokas al la preparo kaj efektivigo de programoj por verda ekonomio, kiuj konsideru kaj traktu la komune konsentitajn principojn de Rio, kaj al la adopto de celoj por daŭrigebla evoluigo en krizaj zonoj, kaj al la efektivigo de direktadaj reformoj por faciligi la transiron al verda ekonomio kadre de daŭrigebla evoluigo kaj elimino de malriĉo, subtenante volontulisman kaj plifortigante la institucian kadron por daŭrigebla evoluigo.

Ni alvokas por anstataŭigo de la aktualaj malŝparaj, nedaŭrigeblaj kaj nejustaj ekonomiaj, monaj, financaj kaj komercaj modeloj per politikoj, kiuj antaŭenigas prefere ol bremsas celojn por daŭrigebla evoluigo kaj kiuj konstruadas prefere ol forkonsumadas la provizon de natura, homa, konstruita kaj socia kapitalo, de kiu homa bonfarto fine dependas. Ni proponas, ke, kie la aktuala ekonomio helpas maljustecon, detruon kaj avarecon, ĝi estu anstataŭata per ekonomio, kiu prizorgas

la homan teran komunumon.

Ni alvokas por la estigo de la proponita financa spezimposto por helpi konstruadi sociajn protekto-sistemojn en la plej senŝirmaj landoj, la malplej evoluintaj landoj, kaj kontribui al daŭrigebla klimatiĝadapto, plifortigi la civilan socion tutmonde kaj subteni pli daŭrigeblajn kaj justajn ekonomiojn.

Ni alvokas por plibonigita aliro al informadaj teknologioj, precipe por gejunuloj, por faciligi kreskon al sanaj komunumoj laŭ ĉiaj sencoj - civitana sindevontigo, sano, sekso, edukado, nutraĵa sekureco kaj socia stabileco.

Ni alvokas la Ĝeneralan Asembleon de UN proklami la 21an de Decembro de ĉiu jaro kiel internacian tagon por malaltkarbona vivmaniero, por esti tago de pripensado pri pli simpla kaj daŭrigebla vivo rekonante la interligitecon de nutraĵo kaj energio, kaj ke la Ĝenerala Sekretario invitu la UNajn membroŝtatojn, interregistarajn organizaĵojn, agentejojn kaj programojn de la UNa sistemo, internaciajn instituciojn, urbojn, la civilan socion kaj interesitajn individuojn kaj volontulojn soleni tiun tagon per konvenaj malaltkarbonaj eventoj tutmonde.

Ni per ĉi tio alvokas registarojn labori en partnereco kun la civila socio, la privata sektoro kaj internaciaj institucioj plenumi la sindevontigojn prezentatajn en ĉi tiu deklaro antaŭ kaj je Rio+20.

Verda ekonomio kadre de daŭrigebla evoluigo kaj elimino de malriĉeco

Nin malkvietigas la aktuala ekonomi-modelo, kiu antaŭenigas nedaŭrigeblajn konsumadajn kaj produktadajn skemojn, faciligas ekstreme maljustan komercosistemon, malsukcesas elimini malriĉon, helpas ekspluatadon de naturaj resursoj ĝis la rando de malapero kaj plena forkonsumiĝo, kaj estigis multoblajn krizojn sur la Tero. Ĝi devas esti anstataŭigata per daŭrigeblaj ekonomioj en komunumaj, lokaj, naciaj, regionaj kaj internaciaj sferoj.

Nin maltrankviligas, ke la superanta ekonomi-evoluiga modelo konstruita sur politikoj, kiaj privatigado, evoluigo direktata al eksportado, strukturŝanĝo, malreguligo, anstataŭigo de naturo per teknologio, kaj premata de la celo kreskigi la Malnetan Enlandan Produkton, MEP, (GDP) suferas pro aro da merkataj kaj instituciaj malfunkcioj, kiuj igas ĝin malefika, nedaŭrigebla, maljusta, kaj malprava rimedo por antaŭenigi daŭrigeblajn evoluigajn celojn.

Ni agnoskas la neceson estigi novan manieron mezuri la progreson al daŭrigebla evoluigo per diversaj indikiloj inter ili pri seksoegalrajteco, kiuj inkluzivas interalie civitanan sindevontigon, integrigante ilin kun tiaj de daŭrigebla evoluigo, prefere ol nur baziĝanta sole sur la MEP de iu lando.

Ni alvokas registarojn kaj aliajn koncernatojn fari sistemecan uzon de loĝantaraj donitaĵoj kaj projekcioj por antaŭvidi kaj plani loĝantaran dinamikon kaj trakti tiurilatajn defiojn en agadema maniero.

Agnoski homajn rajtojn kaj liberojn, registaroj vastigu individuajn elektojn kaj ŝancojn certigante universalan aliron al seksa kaj reprodukta sano kaj familia

planado, sinpovigo de virinoj, kaj investo en edukado, precipe de malfavorataj infanoj kaj junularo, kaj knabinoj kaj junulinoj.

Ni alvokas por plena kaj efika efektivigo de Agendo 21, la Jarmilaj Evoluigaj Celoj, la Pekina Agadoplatformo, kaj la Internacia Konferenco pri Loĝantaro kaj Evoluigo, por certigi gejunulajn rajtojn al edukado, dungiteco kaj sano, emfazante seksan kaj reproduktan sanon, interalie aliron al kontraŭkoncipiloj, kaj universalan aliron al HIV/Aidoso-preventado kaj kuracado komprenante la ligojn inter sociala, ekologia kaj loĝantara dimensioj.

Ni alvokas registarojn komenci debaton, kiu agnoskas la elektojn, kiujn ni devas fari pri homa loĝantaro, konsiderante la limojn de la nutrokapacito de la planedo kaj la neceson ebligi justan kaj egalrajtan uzon de haveblaj resursoj kaj ankaŭ lasi spacon por faŭno kaj sovaĝejo.

Ni konscias, ke la indico de homa disvolviĝo de la UNa Evoluiga Programo uzis unuafoje socialajn indikilojn kiel edukadon, seksan egalrajtecon kaj vivdaŭran esperon por mezuri evoluon, kaj, ke okazos grava plialtiĝo de homa bonfarto, kiam registaroj efektigos la Iniciativon de la Universala Kunveno por Sociala Protekto.

Ni cetere agnoskas, ke la merkataj kaj instituciaj eraroj prenas la formon de prezoj, kiuj ne reflektas ilian veran ekologiajn kaj socialajn kostojn, malsufiĉan investon en naturan, homan, konstruitan kaj socialan kapitalon, malutilajn kaj perversajn subvenciojn, limigitan aliron al informoj pri produktadaj teknologioj kaj ties efikojn, mankon de demokrata ekonomia direktado, pliigantan senlaborecon kaj neadekvatajn indikilojn pri progreso.

Ni firme kredas, ke verdaj ekonomioj kadre de daŭrigebla evoluigo kaj elimino de malriĉeco estu ekonomiaj sistemoj, kiuj nutras civitanan partoprenon; postulas socialan justecon kaj egalrajtecon kaj seksan egalrajtecon; protekton de ekologiaj sistemoj; estigon de ekonomia sufiĉeco, kaj kiuj celas por la kerna ideo, ke verdaj ekonomioj plibonigu daŭrigeblan evoluigon kaj prosperon de ĉiuj landoj; certigas la bonfarton de ĉiuj homoj; respektas la rajtojn, kulturojn, lingvojn kaj scion de indiĝenaj gentoj kaj lokaj komunumoj; sekurigas la bonfarton de bestoj kaj konservas biologian diversecon por estontaj generacioj, dume emfazante, ke verda ekonomio ne anstataŭigas daŭrigeblan evoluigon.

Ni agnoskas, ke justa transiro al verdaj ekonomioj ene de daŭrigeblaj socioj estas kadre de daŭrigebla evoluigo, elimino de ekstretoj de riĉeco kaj malriĉeco, klimata justeco, kaj justa investo en homaj edukado, sano, kaj deca laboro kaj ĝusta vivtenado.

Ni ankaŭ agnoskas, ke verdaj ekonomioj ene de daŭrigeblaj socioj ankaŭ certigu seksan egalrajtecon, demokration, plibonigon de homa bonfarto, redukto de ekologiaj riskoj, kaj certigo, ke laborpostenoj kaj sociala bonfarto estas juste distribuataj inter ĉiuj popoloj;

Konsiderante, ke daŭrigeblaj ekonomioj devus baziĝi sur prudenta politikofarado, ni bezonas vojojn al la verdaj ekonomioj, malaltkarbons evoluo kaj novaj monpolitikoj kun klaraj kaj devigaj celoj kaj cel-datoj.

Tial ni alvokas al registaroj:

- Certigi ekspluatadon de materialoj nur laŭ daŭrigebla maniero kaj surbaze de sufiĉeco, kaj ke ĉi tiuj resursoj estas efike utiligataj.
- Certigi la reuzon de ruboj kiel krudmaterialon por novaj produktoj por mtempe la vivociklon kaj ekagi provizante la taŭgajn instigojn por esplorado kaj realigado.
- Stadie nuligi subvenciojn por fosiliaj bruligaĵoj, starigi ekologie kaj sociale favorajn fiskajn instigojn, kaj funkciigi ampleksajn novigajn fontojn de financado, kia la proponita financ-transakcia imposto.
- Faciligi la transiron al ekologie bazita, fortika, justa, ĉioninkluda kaj humaneca agrokultivado, kaj la estigo de partoprena mekanismo por kontroli la transiron. La tutmonde milionoj da etterenaj kultivistoj, precipe virinoj, estu politike sinpovigataj kaj ebligataj aliri al konvenaj rimedoj kaj justaj merkatoj.
- Efektivigi justan transiron al daŭrigeblaj ekonomioj laŭeble plej baldaŭ per senprecedenca nivelo de kunlaborado kaj politika kohero je la loka, ŝtata, nacia kaj internacia niveloj, por sud-al-suda kaj triangula kunlaborado, per la kundivido de verdaj teknologioj kaj scipovoj, per restrukturado de reguliga, imposta kaj elspeza politikoj, kaj per estigo de demokrata kontrolo de ekonomia politika decidofarado.
- Estigi verdajn laborpostenojn kaj verdigi ekzistantajn laborpostenojn kun speciala atento por junularo, virinoj kaj malfavorataj grupoj.
- Anstataŭigi aŭ suplementi MEPajn kaj alia tradiciajn ekonomiajn mezurilojn per pli larĝaj indikiloj.
- Instituciigi normojn pri daŭrigebla aĉetado, kiuj inkluzivas tiujn, kiuj kuraĝigas la uzon de reciklitaj produktoj kaj renovigebla energio.
- Fortigi lokajn ekonomiojn kaj eviti la detruon de arbaroj kaj biologian diversecon per subteno al sendependaj atestadaj sistemoj surbaze de fortikaj principoj, aplikotaj de travidebla kaj ekvilibraj partoprenaj procedoj certigantaj la rajtojn kaj interesojn de indiĝenaj gentoj kaj lokaj komunumoj, kaj kun sendependa, surloka monitorado, raportado kaj konfirmado. Registaroj kaj la privata sektoro promesu konkretan kaj sistemecan subtenon kaj antaŭenigon de tiaj atestadosistemoj pri multkoncernate administrata arbaro en ĉiuj partoj de la mondo, kun aparta emfazo pri la tropikaj pluarbaroj.
- Antaŭenigi interŝanĝan subtenon inter komerco kaj daŭrigebla evoluigo kaj ekologi-afablaj justokomercaj produktoj.
- Reguligi la ekonomion por haltigi spekuladon pri nutraĵoj kaj tutmondaj komunaĵoj.
- Antaŭenigi lokajn alternativajn ekonomiojn, kiel tempobankoj, kompletigaj monsistemoj, kaj rekonsideri la monsistemon por igi ĝin bazite sur de karbon-normo.

Institucia kadro por daŭrigebla evoluigo

Ni alvokas por la establo de tutmonda kunordiganta mekanismo pri daŭrigebla evoluigo kaj de paralelaj institucioj je la nacia nivelo, rajtigita plutrakti tutsisteman politikan koherecon por la institucioj de Bretton-Woods-aj kaj UNaj institucioj por antaŭenirigi principojn pri daŭrigebla evoluigo, metodojn kaj politikojn laŭ kunordigita maniero.

Tia mekanismo impliku interaktivajn multkoncernatajn forumojn kaj regulajn renkontiĝojn de ŝtataj kaj registaraj estroj por taksu evoluojn kaj estigi gvidadon en ekonomiaj, sociaj kaj ekologiaj aferoj, por gvidi kaj kontroli la tutmondan daŭrigeblan produktadon kaj konsumadan direktadan proce, kaj helpi sekuran konsekvencon kaj koherecon en la politikaj celoj de ĉiuj ĉefaj internaciaj organizaĵoj.

Ni alvokas ankaŭ por la establo aŭ reformo de subkomitatoj pri daŭrigebla konsumado kaj produktado por igi ilin funkcii ene de naciaj konsilioj por daŭrigebla evoluigo, kun mandato konsili ĉiujn naciajn agentejojn pri daŭrigebla konsumado kaj produktado kaj naciajn reprezentantojn en la interregistaraj mekanismoj por daŭrigebla konsumado kaj produktado. Sufiĉe provizitaj naciaj konsilioj por daŭrigebla evoluigo estu instalataj por okazigi la transiron al verdaj ekonomioj kaj evoluigi naciajn daŭrigeblan verdekonomian vojmapon por ĉiu membroŝtato de UN ĝis 2017.

Ni alvokas plie por la fortigo de naciaj kaj internaciaj ekologiaj leĝoj, la estigon de Internacia Ekologia Tribunalo kaj por la fortigo de enlandaj justicoj por pritrakti ekologiajn disputojn.

Ni alvokas por la enpostenigo de publikaj rajto-defendantoj por Estontaj Generacioj je tutmonda, nacia kaj loka niveloj, kiuj advokatu por daŭrigebla evoluigo kiel antaŭvidita kaj difinita de la Brundtland-Komisiono: por plialtigi la bonfarton kaj perspektivojn de estantaj kaj estontaj generacioj, por sufiĉi al ilia bezono, por servi kiel revizoro kerne de registaroj kaj pritrakti civitanajn plendojn.

Ni alvokas por la starigo de interregistara intertraktanta komitato por estigi kadrokonvencion pri firmaa ekologia kaj socia respondeco, por la respondigebleco de kompaniaj investoj de ĉiuj firmaoj listigitaj en borsoj tutmonde kaj enkalkuli la normo ISO 26000 pri kompania respondeco.

Ni insistas pri la adopto de interregistara mekanismo aŭ ilo por taksu la ekologiajn, sanajn kaj sociekonomiajn efikojn de novaj kaj novaperantaj teknologioj, konforme al la antaŭgarda principo. Ni alvokas por kompleta malpermeso de teknologioj, kiuj estigas gravan riskon por la planedo.

Ni alvokas por la instalo de interregistara traktada komitato por estigi kadrokonvencion pri prijuĝo de internaciaj sekvoj por daŭrigeblo, necesiganta la prijuĝadon de la sekvoj por daŭrigebleco de iuj projektoj, planoj, programoj, politikoj kaj leĝdonaj iloj.

Ni alvokas al la konferenco Rio+20 lanĉi intertraktadojn por la instalo de internacia kunsido sur principo 10 de la Rio-Deklaro, kiu pritraktas aliron al informoj, publika partopreno kaj ekologia justeco.

Ni cetere alvokas al la konferenco Rio+20 kuraĝigi la evoluigon de regionaj

kongresoj pri Principo 10, inviti interesatajn ŝtatojn konsenti pri la Aarhus-Konvencio kaj mandati la UN Ekologian Programon (UNEP) evoluigi fortikan programon por efektivi la Gvidliniojn de Bali pri Principo 10 de la jaro 2010.

Ni alvokas por fortigo de ekzistantaj UNEP-korpusoj kaj plialtigo de la statuso de UNEP al altnivela korpuso en la UNa sistemo.

Ni alvokas por vasta ratifiko kaj efika funkciigo de ĉiuj plurflankaj ekologiaj interkonsentoj.

Ni alvokas naciajn registarojn ratifiki kaj efike funkciigi la 1997an traktaton de UN pri Akvofluejoj, la sola tutmonda priekologia traktato, kiu ankoraŭ ne ekefikis.

Ni alvokas UN-on popularigi daŭrigeblan evoluigon en la procedo de Unueca Agado (Delivering as One, UN 2005).

Ni alvokas registarojn certigi, ke la Libera Antaŭinformita Konsento (kiu rilatas al al UN Deklaracio de 2007 pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj) estas efektivigata koncerne evoluigajn decidojn, kaj aliajn decidojn, kia Redukti Eligojn de Senarbarigo kaj Malplibonigo de Grundo, kiu efikas al indiĝenaj popoloj, indiĝenaj grupoj kaj tribaj kaj lokaj komunumoj.

Ni alvokas kompaniojn engaĝi la junularon por fari iniciatojn pri daŭrigebla evoluigo kiel kernan parton de sia laboro, konsiderante lokajn komunumojn.

Ni alvokas ĉiujn koncernatojn por malfermiteco al novaj manieroj volontuli kunigante kaj engaĝigante homojn pere de interreto kaj aliaj novaj teknologioj.

Ni rekomendas, ke kunagadaj strategioj inter komunumoj kaj la privata sektoro per programoj de Sociala Respondeco de Korporacioj, kiaj volontuligo de dungitoj, plibonigo de nunaj volontuladaj eblecoj por kontribui al tutmonda daŭrigebla paco kaj evoluigo.

Ni rekomendas la inkluzivon de volontuladoj en ĉiuj tutmondaj, naciaj kaj lokaj planoj kaj prioritatoj por paco, daŭrigebla evoluigo kaj homa bonfarto por devontigi sin al la estigo de ebliganta ĉirkaŭaĵo, en kiu civitana engaĝiĝo kaj libervola agado povas prosperi.

Ni rekomendas antaŭenigon de junularaj strategioj, kiuj engaĝas gejunulojn kiel agantojn por daŭrigebla evoluigo kaj paco.

Ni rekomendas la dokumentadon kaj interŝanĝadon de plej bonaj praktikoj pri la rolo de volontuloj, precipe je la komunuma nivelo, en paco, daŭrigebla evoluigo kaj penado por homa bonfarto, inkluzivantan ĉiun fazon de katastrofa mastrumado - preventadon, mildigon, preparitecon, intervenon kaj restarigon;

Ni rekomendas la estigon de akademio de Olimpikaj Volontuloj efektivigata de la estintaj direktoroj de programoj pri Olimpikaj Volontuloj en gastigantaj urboj de la Olimpikaj Ludoj, kun la rekte ligita kunlaboro de interesataj Neregistaraj Organizoj kaj membroj de la anaro de Internacia Olimpika Komitato, kaj ke volontulismo estu oficiale agnoskata kiel la kvara subtenilo de la Olimpika Movado, kune kun sportoj,

kulturo kaj la natura medio;

Ni alvokas al:

- Registarojn agnoski la potencon, ekonomian kaj socian valoron de volontulismo por atingi celojn de nacia evoluado kaj bonfarto, kaj provizi helpeman medion por daŭriganta volontulismo kun rimedoj kaj subteno por bazostrukturo, kaj ankaŭ agnoski la valorojn de civitana partopreno.

- La privatan sektoron aktive okupiĝi pri volontulado kaj partnerado de dungitoj plibonigante la povojn de voluntuloj, inkluzivante organizaĵojn por atingi daŭrigeblan pacon kaj evoluigon.

- La amaskomunikilojn komuniki al la publiko la valoron de volontulismo kaj kiel koncernato aliĝi por antaŭenigo de helpema medio por komunuma engaĝigo kaj volontulismo.

- La civilan socion popularigi volontulisman kaj strategiojn por civitanan engaĝiĝon en programoj por daŭrigebla paco kaj evoluigo.

- Edukajn instituciojn kaj universitatojn integri volontulisman kaj komprenon de la civila socio en instruplanojn kaj similajn strukturojn por antaŭenigi pli profundan kaj pli universalan komprenon de civila servo kaj volontulado.

- La esploran komunumon efektivigi krome pli da esploro kaj studoj pri la valoro kaj efiko de volontulismo al la evoluigo kaj pri la rolo de volontulado en prevento de kaj reago al krizoj, kaj evoluigi novajn indikilojn de progreso, kiuj enkalkulas civitanan engaĝiĝon, voluntulan agadon kaj homan bonfarton.

- Konfesiajn tradiciojn konfirmi volontulado por paco kaj evoluigo kiel konvenan respondon al la spirita voko por servo kaj homa bonfartigo.

- Organizaĵojn implikantajn volontulisman certigi la efikecon kaj respondigeblon de volontulismo per prudenta direktado, evoluigo de la kapablo estri voluntulojn, kaj por kontrolado kaj taksado de efikeco.

- Ĉiuj koncernatojn alvoki por Monda Koalicio de Voluntuloj por provizi platformon por antaŭenigo, kundivido de scioj, evoluigo de kapabloj, kaj kolektivaj agadoj pri volontulismo.

- Registarojn, la sistemon de Unuiĝintaj Nacioj kaj aliajn koncernatojn renovigi siajn penojn efektivigi Rezolucion A/RES/56/38 kaj sekvajn de la Ĝenerala Asembleo pri rimedoj subteni volontulisman kaj antaŭvidi pliajn agojn de la Asembleo rememorigante la dekan Internacian Jaron de Voluntuloj kaj daŭre vokante al tutmonda agnosko, subteno kaj konsiloj por volontulismo rilate daŭrigeblan pacon kaj evoluigon.

Ni alvokas registarojn kaj koncernatojn adopti ampleksan kaj unuecan pritrakton al daŭrigebla evoluigo kaj homa bonfartigo tra seksegalece sentema komunumo-orientita alproksimiĝo, kiu utiligas la gravan rolon, kontribuojn kaj valoron de voluntuloj por trakti daŭrigeblan evoluigon, vivtenojn, justan komercadon, nutraĵan nesekurecon, energion, arbarigon, akvon, sanon, HIV/Aidoson, katastrofojn kaj aliajn

aferojn.

Ni alvokas la aktorojn de la Araba Printempo rapide instali siajn proprajn Ne-Registarajn Organizaĵojn, kaj peti asociiĝon kun UNa Departemento pri Publikaj Informoj, kaj komuniki kun UN, kaj disvastigi informojn pri UN al siaj loĝantaroj kaj aliaj neregistaraj organizaĵoj, tiel kompensante kiel eble plej baldaŭ la malŝparitajn jarojn sub diktatoradoj kiam libereco sin esprimi ne eblis.

Ni alvokas Ne-Registarajn Organizaĵojn en Mezoriento kaj Norda Afriko, kaj la Araba regiono, peti siajn registarojn inviti UNan Departementon pri Publikaj Informoj gastigi la 65an ĉiujaran Konferencon de la Departemento de Komunikadoj kaj Publikaj Informoj por Ne-Registaraj Organizaĵoj.

Ni cetere alvokas la estraran komitaton de Ne-Registaraj Organizaĵoj kunligitaj kun la UN Departemento pri Publikaj Informoj adopti la sekvantan temon por ajna konferenco dediĉata al, aŭ gastiganta en Mezoriento kaj Norda Afriko, kaj la Araba regiono: "Diverseco: la sola vojo al daŭrigebla paco kaj evoluigo".

Ni alvokas registarojn agnoski la gravecon de la civilsociaj organizaĵoj por la antaŭenigo de volontulismo kaj agnoski, ke fortigi la dialogon kaj interrilaton inter la civila socio kaj Unuiĝintaj Nacioj kontribuas al la vastigo de volontulismo.

Ni notas kun danko la kontribuojn de UNaj Volontuloj dum la lastaj 10 jaroj okaze de la 10a datreveno de la Internacia Jaro de Volontuloj.

Ni ankaŭ notas kun danko la penojn de ĉiuj partoprenantoj de la Konferenco pliigi la konscion pri volontulismo per tutmonda provizado de servoj, kundividado de informoj kaj edukado.

Daŭrigeblaj vivmanieroj:

Ni firme kredas, ke nia planedo kaj la homa tera komunumo postvivos, viglos kaj prosperos nur per movo al ekonomio, kiu estas daŭrigebla kaj justa, kaj fokusita al la elimino de ekstretoj de riĉeco kaj malriĉeco per la agoj de respondemaj civitanoj kaj volontulismo.

Ni notas, ke nedaŭrigeblaj konsumadaj kaj produktadaj kutimoj precipe kontribuis al klimatŝanĝiĝo kaj malriĉeco, kaj ke daŭrigebla evoluigo povas esti certigata nur se homaro, direktata kaj gvidata de registaraj politikoj, adoptas humanajn, daŭrigeblajn, et-karbonajn vivostilojn kaj adoptas daŭrigeblajn vivmanierojn.

Ni notas, ke daŭrigeblaj vivostiloj kaj vivmanieroj estu konstruataj sur daŭrigebla konsumado kaj produktado en nia tutmondiĝanta planedo kaj sur egalrajteco inter generacioj, seksoj, landoj, kulturoj kaj lingvoj.

Ni agnoskas, ke daŭrigebla konsumado precipe devas konsideri la influo-minimumigon de aĉetaj decidoj kaj la maksimumigon de la socia efiko de niaj aĉetoj al la ekologio.

Ni do rekonfirmas, ke individuoj, familioj kaj komunumoj estas ĉefaj aktoroj en la atingado de daŭrigebla konsumado kaj produktado kaj estu sinpovigataj kaj

kapabligataj per edukado en la kompetentecoj pri ĉiutaga vivo preni sur sin la respondecon atingi daŭrigeblajn vivstilojn tutmonde.

Civitana engaĝiĝo en direktado de daŭrigebla evoluigo:

Ni notas, ke faciliga direktado de plurflankaj interkonsentoj pri la medio, baziĝante sur la fundamentoj de komunuma partopreno kaj direktadaj strukturoj kaj edukado por daŭrigebla evoluigo, povas estigi pli bonan komprenon por solvi kompleksajn demandojn pri daŭrigebleco.

Ni denuncas la kreskantan nesufiĉon da rimedoj por la civilsociaj organizaĵoj, subpreman agadon kontraŭ sociaj movadoj kaj la pliiĝantan kriminaligon de ekologiaj kaj indiĝenaj movadoj en multaj landoj fare de registaroj kaj grandaj transnaciaj kompanioj.

Ni cetere rekonfirmas, ke civitana partopreno, kiu inkluzivas volontuladon, estis valora partnero en larĝa spektro de pacigo kaj agadoj por daŭrigebla evoluigo, kun supera celo al elimino de malriĉeco kaj la plibonigo de la homa farto, inter kelkaj aliaj celoj.

Ni ankaŭ agnoskas la kontribuojn de la civila socio, movadoj de Ne-Registaraj Organizaĵoj, laborsindikatoj, socialaj entreprenistoj, kaj volontulaj aliancoj kaj asocioj, pretaj kundividi respondecojn kun lokaj kaj naciaj registaroj en siaj komunumoj.

Ni notas la minacojn al la libero esprimi sin, asociiĝi kaj kunveni. Nemalhaveblas, ke la principoj konservataj en la UNa Deklaro pri Defendantoj de Homaj Rajtoj estas respektata en leĝo kaj en praktiko.

Ni rekonfirmas, ke vera involviĝo de junularo, virinoj, kaj la plia civila socio en decidofaraj procezoj kaj partnerecoj, kiel emfazite en Agendo 21, Sekcio 3, estas esenca por sukcesigi iniciatojn por daŭrigebla evoluigo.

Aliaj temoj konsiderendaj je Rio+20

Edukado kaj lernado pri daŭrigebla evoluigo

Ni agnoskas la neceson rekonfirmi la UNan Jardekon pri Edukado por Daŭrigebla Evoluigo.

Ni firme kredas, ke la ŝanĝiĝo al daŭrigebla socio ege dependas de la eduka sistemo.

Ni asertas, ke edukado traktu la materialajn, sociajn kaj spiritajn flankojn de homa evoluigo, kaj en ĝia plej ampleksa senco, edukado devas provizi la spacon por valorbazita daŭrigebla lernado.

Ni alvokas por respekto al kaj inkluzivo de etnaj lingvoj en la eduka sistemo, ĉar tiuj lingvoj entenas la kompleksecon de siaj rilataj naturmedioj, kaj por konsidero de la potencialo de neŭtrala internacia lingvo, kiu kombinas facilan ellernadon kaj klarecon kun neŭtraleco, kaj tial rigardeblas kiel esence daŭrigebla.

Ni alvokas edukajn instituciojn pliigi sian partoprenon en la transforma procezo al daŭrigebla socio, por plibonigi la formadon de kompetentecoj de la komunumoj, en kiuj tiuj institucioj troviĝas, estigi medion, en kiu kontentiga kaj daŭrigebla edukado povas okazi, evoluigante nacian respekton por edukado en natura, kultura kaj monda heredaĵo, samtempe popularigante edukadon por daŭrigebla evoluigo en dumviva lernado.

Ni agnoskas, ke muziko kiel natura rimedo kaj kiel tutmonda komunaĵo estu uzata en edukado por konekti generaciojn kaj tutmondajn komunumojn, por doni voĉon al ĉiuj kaj por partopreni en tutmondaj demandoj provizante solvojn de tutmondaj defioj.

Ni konscias, ke sukcesa edukado kaj lernado ĉiaforma dependas de la plena subteno de registaroj je ĉiuj niveloj, de la privata sektoro, de politikfarantoj kaj de civila socio.

Ni sugestas la instalon de laboratoriaj lernejoj kadre de postkonflikta evoluigo, kiuj instruos kapablojn en diversaj fakoj inkluzivantaj sportojn, por evoluigi amplekse pensantajn civitanojn.

Celoj de daŭrigebla evoluigo

Por atingi la celojn de Rio+20 en ambicia, tempolimigita kaj respondigebla maniero, ni alvokas registarojn konforme al homaj rajtoj, la principo de komunaj sed diferencigitaj respondecoj kaj respektivaj kapabloj adopti la sekvontan projekton pri Celoj de Daŭrigebla Evoluigo (CDE) kune kun la subceloj, kialoj kaj klarigoj rilataj al ĉiu celo:

La ĉi-subaj celoj estas aspirindaj. Dum iuj estas bazitaj sur sindevontigoj jam faritaj de registaroj kaj aliaj koncernatoj, aliaj estas proponitaj surbaze de altnivela pensado inter la civilsociaj organizaĵoj.

CDE: Daŭrigebla konsumado kaj produktado

Je 2020, konsekvence kun la Strategia Plano por Biologia Diverseco adoptita ĉe la 10a kunsido de la Konferenco de la subskribintoj de la Traktato pri Biologia Diverseco, la homa ekologia piedsigno estas reduktata tiel, ke restu ene de la Tera biologie difinita kapacito. Konforme al la principo de komunaj sed diferencigitaj respondecoj, ni alvokas naciojn kaj loĝantarojn trafitaj de malŝparema trokonsumado redukti siajn efikojn kaj helpi pliigi la konsumon da nemalhaveblaj varoj kaj servoj por malriĉaj landoj kaj popoloj, tiele ili ankaŭ povas ĝui akcepteblan altan vivnivelon, kiu estigas justan alireblon al sanzorgoj, decajn laborŝancojn kaj edukadon.

Plej laste en 2020 registaroj antaŭenigu produktadajn procedojn, kiuj reprezentas la plej bonan haveblan teknikaron por ekologia efikeco, reuzado, refabrikado, reuzo de rubaĵo, stabileco kaj longa vivdaŭro de produktoj. Malŝparaj praktikoj kiel planita eksmodiĝinteco kaj neripareblo estu identigitaj kaj eliminataj. Normoj por mendado kaj instigoj de publikaj administracioj agnosku gvidantajn kompaniojn, kiuj kundividu kaj disvastigu plej bonajn verdajn praktikojn tutmonde. Plej laste en 2020 la plimulto de la mondaj varoj kaj servoj estu akirata de registaroj el fontoj

certigitaj de objektivaj triaj partioj kiel daŭrigeble produktitaj.

Ĉi tiu celo rilatas al la preparo kaj efektivigo de direktiloj pri daŭrigeblo aŭ verda ekonomio, kiuj konsideras kaj traktas komune konsentitajn daŭrigeblecajn principojn, adoptas celojn por daŭrigebla evoluigo en krizaj zonoj, kaj efektivigas direktadajn reformojn por faciligi la transiron al verda ekonomio kaj por plibonigi la institucian kadron por daŭrigebla evoluigo.

Cetere estigi aron da Jarmilaj Celoj pri Konsumado por la periodo 2012-2020 al kreo de intergeneracie kaj internacie dividita rajto por justaj konsumŝancoj kaj certigo de vivokvalito kaj bonfarto de ĉiuj homoj plej laste en 2020, dume eliminante ĉiujn specojn kaj nivelojn de malriĉeco, respektante la bonfarton de bestoj kaj enkadrigante sufiĉecon bazitan sur daŭrigeblaj ekonomioj.

CDE: daŭrigeblaj vivmanieroj, junularo kaj edukado

Plej laste en 2015, landoj devontigu sin al la principo de daŭrigeblaj vivmanieroj kiel rajto por ĉiuj homoj kaj efektivigu monajn, fiskajn kaj lingvajn politikojn por kuraĝigi plenan kaj decan laboron. Plej laste en 2020, konsideroj pri servoj por biologia diverseco kaj ekologia sistemo estu ĉefaj ene de nunaj kamparevoluigaj platformoj kaj iniciatoj por konservi daŭrigeblajn vivmanierojn en indiĝenaj kaj lokaj komunumoj, kiuj dependas de natura kapitalo por postvivi.

Plej laste en 2015, registaroj inkluzivu en siajn evoluigajn kadrojn kiel prioritaton investojn en la edukadon, sanon kaj dungadon de junularo, kiuj konsistigas grandan proporcion de la loĝantaro de evolulandoj kaj alfronti misproportciajn nivelojn de malriĉeco, senlaboreco, seksa diskriminacio kaj malbona sano.

Registaroj aprobu ampleksajn politikojn, junularan partoprenon kaj multsektorajn programojn, kiuj sinpovigas estantaj kaj estontajn generaciojn por plene kaj libere uzi siajn homajn rajtojn, plenumi siajn aspirojn kaj iĝi produktemaj civitanoj.

Plej laste en 2030, naciaj registaroj redirektu ĉiujn naciajn celojn al atingo de daŭrigeblaj socioj kaj faciligu la daŭrigeblan evoluigon en ĉiuj naciaj edukaj politikoj kaj instruplanoj.

Plej laste en 2020 konsekvence kun la Strategia Plano pri Biologia Diverseco, registaroj certigu, ke homoj konsciu la valorojn de biologia diverseco kaj la paŝon, kiun ili povas fari por konservi kaj uzi ĝin daŭrigeble.

CDE: Klimata daŭrigeblo

Plej laste en 2050, registaroj estu atingintaj klarajn vojojn al klimata daŭrigeblo, kiu reguligas la tutmondan altiĝon de la temperaturo sub 1.5 grado. Eligaĵoj de forcejaj gasoj estu reduktitaj per 25% de la 1990aj niveloj plej laste en 2020, 40% en 2030, 60% en 2040 kaj 80% plej laste en 2050. Karbon-impostoj kaj tarifoj estu instalitaj por starigi instigojn por et-karbona evoluigo kaj fabrikado, financado de projektoj por redukti forcejgasajn eligojn kaj redukti eligojn el senarbarigo kaj malplibonigo de grundo (REDD), por aliaj kompenso-mekanismoj kaj verdinfrastukturajn solvojn por helpi senŝirmajn komunumojn adaptiĝi al klimatsanĝiĝo.

Evoluintaj landoj, kiel la ĉefaj kaŭzantoj de klimatoŝanĝiĝo, antaŭsupozante ilian historian respondecon, agnosku kaj akceptu sian klimatoŝuldon en ĉiuj ties dimensioj kiel la bazon por justa, efika, kaj scienca solvo por klimatoŝanĝiĝo. La ĉi-supra celo inkluzivu la justan dividon de restanta atmosfera spaco, konsiderante la pasintan uzadon kaj konsumon kaj meza- kaj longatempan eligoredukto-celojn, kiuj estas konformaj al tio, kion la scienco postulas.

CDE: Pura energio

Ne pli malfrue ol en 2030, almenaŭ 50% de la monda energiprovizado venu de renovigeblaj fontoj.

Plej laste en 2020 energibezono estu reduktita per efikeco kaj konservado per almenaŭ 20%. Plej laste en 2030 energia malriĉeco estu eliminata provizante universalan aliron al modernaj energiservoj el renovigeblaj fontoj.

CDE: Biologia diverseco

Registaroj estu instigitaj plenumi siajn sindevontigojn efektivi la Strategian Planon por Biologia Diverseco, precipe tiun rilatan al la Verda Ekonomio, kia celo 2, kiu signifas ke plej laste en 2020 valoroj pri biologia diverseco estu integritaj en nacia kaj loka evoluigaj kaj malriĉeco-reduktantaj strategioj kaj planadaj proceduroj kaj estu enkadritaj en nacia kontado, kiel konvenaj, kaj raportaj sistemoj; kaj celo 3, kiu signifas ke ne pli malfrue ol en 2020, instigoj, ankaŭ subvenciaj, malutilaj al biologia diverseco estu eliminataj, stadi nuligitaj aŭ reformitaj por minimumigi aŭ eviti negativajn efikojn. Ni alvokas registarojn subteni investojn en naturan bazostrukturon kaj ekologian restarigon kaj faciligi la evoluigon de merkatoj, kiuj valorigas la reguligajn servojn provizitajn de ekologiaj sistemoj.

CDE: Akvo

Plej laste en 2030, registaroj atingu universalan haveblon de akceptebla kvanto kaj kvalito da akvo por sano, vivoteno, ekologiaj sistemoj kaj produktado, adekvata sanitaro, kuplita kun akceptebla nivelo de akvorilataj riskoj por homoj, medioj kaj ekonomioj. Ĉi tiu celo estas aldona kaj pli alta ol la atingo de la Jarmilaj Evoluigaj Celoj kaj aliaj internacie konsentitaj evoluigaj celoj. La rajto je sekura kaj pura trinkakvo kaj sanitaro estu agnoskita kiel homa rajto kaj estu la respondeco de ĉiuj ŝtatoj respekti tian rajton. Kiel intertempa celo, ne pli malfrue ol en 2015 la proporcio de tiuj, kiuj ne povas atingi aŭ povas pagi la koston de sekura trinkakvo, kaj al kiuj mankas baza sanitaro, estu duonigita kiel konsentite en la Johannesburga Plano de Efektivigo.

De 2020, lokaj, urbaj kaj naciaj registaroj kaj ĉiuj koncernatoj devontigu sin atingi la sekvantajn intertempajn celojn:

- 20%a pliigo de entuta efikeco de la nutraĵa provizoĉeno - reduktante perdojn kaj malŝparojn survoje de kampo ĝis telero
- 20%a pliigo en efikeco de akvo en agrokultivado - pli da nutraĵoj kaj plantoj per unu gutu

- 20%a pliigo de akvo-uza efikeco en energiproduktado - pli da kWh "per unu guto"
- 20%a pliigo de la kvanto de reuzata akvo
- 20%a malpliigo de akvomalpurigo

CDE: Sanaj maroj kaj oceanoj (blua ekonomio)

Plej laste en 2020, konsekvence kun la Strategia Plano pri Biologia Diverseco, registaroj establu protektataj areoj, almenaŭ 10%ojn da marbordaj kaj maraj areoj. Plej laste en 2030, oceanaĵaj mortintaj zonoj estu resanigataj per redukto de nitrogena defluo de terenoj per almenaŭ 50%. Plej laste en 2020, maraj protektataj areoj estu establitaj en almenaŭ 25% el ĉiuj ekskluzivaj ekonomiaj zonoj kaj sur altaj maroj taŭge interligitaj kaj kapablaj restarigi almenaŭ la minimumon da vivipovaj vivantaroj minacataj, protektante la maran biologian diversecon, kaj maksimumigante profitojn al komerca kaj porviva fiŝkaptado en ĉirkaŭaj partoj de la maro. Ekde 2015, je fiŝkaptado la uzo de fundo-trenretegoj, dinamito, elektro, venenoj kaj aliaj nedaŭrigeblaj praktikoj estu eliminataj. Plej laste en 2030, inversigi la malpliigon da fiŝrezervoj kaj estigi daŭrigeblajn, diversajn kaj abundajn fiŝrezervojn, subtenataj de sana vivejo por provizi la bezonojn de ĉiuj uzantoj, kaj plej laste en 2015, fini la praktikon fortranĉi naĝilojn je ŝarkoj.

Ni ankaŭ faras la sekvontajn politikajn rekomendojn: (a) redukti malpurigadon per plasto en la oceanoj, inkluzive la malpermeson aŭ imposton pri unufoje uzotaj plasto, subteni la uzon de reciklotaj plasto en novaj produktoj, kaj igi produktantojn respondecaj pri plasto dum ties tuta vivciklo; (b) establi internacian kontrolreton pri oceana acidiĝo por ebligi, ke la identigo de vundeblaj regionoj kaj industrioj kaj por estigi fruan avertosistemon por industrioj jam spertantaj malutilon; (c) proklami la altajn marojn de la Centra Arkta Oceano kiel zonon por internacia scienca kunlaboro, kie elfosaj kaj malpurigaj aktivaĵoj estu ĉesigataj ĝis ni havos pli bonan komprenon pri la regiono kaj la eblaj efikoj de tiaj aktivaĵoj; kaj (d) plani kiel urĝan aferon, interregistaran konferencon por trakti la pliiĝantajn minacojn al oceanaĵaj regionoj ekster la jurisdikcio de individuaj nacioj.

CDE: Sanaj arbaroj

Plej laste en 2020, ĉiuj restantaj originalaj arbaroj estu protektitaj kontraŭ konverto kaj degenero, konsekvence laŭ la Strategia Plano por Biologia Diverseco per sufiĉaj rimedoj kaj juste regita mekanismo Redukti Eligojn el Senarbarigo kaj Malplibonigo de Grundo (RESM+), kiu respektas la rajtojn kaj sciojn de indiĝenaj popoloj kaj lokaj komunumoj kaj aliaj ekologiaj kaj regaj sekurigantoj, por rekompenci evolulandojn ppor ilia protektado kaj daŭrigebla mastrumado de siaj arbaroj, ne nur por karbonkaptado kaj karbonstokado sed por la pli vastaj ekologiaj servoj de la arbaroj. Politiko postulanta nenian netan perdon de arbaroj, tutmonde kaj tutlande, ankaŭ estu atingita plej laste en 2020. Tiutempe, ĉiuj novaj arbar-areoj senarbigitaj estu kompensataj de ekologie fidinda restarigo de arbaroj en apudaj lokoj. Restarigo de pli ol 150 milionoj da hektaroj da senarbigita aŭ degenerinta arbara pejzaĝo estu atingita plej laste en 2020, per la estigo de milionoj da novaj laborpostenoj kaj plibonigitaj vivmanieroj, plibonigita sekureco kaj adapto al klimatsanĝiĝo.

Redukti senarbigajn eligaĵojn de elstaraj firmaoj kaj ties provizaj ĉenoj devontigante sin eviti la aĉeton de produktoj, kiuj kaŭzas senarbarigon, kiaj sojo aŭ bovoj de senarbarigitaj landoj en la Brazila Amazonio, palmoleo de senarbarigita agrokultivaj landoj en Indonezio, aŭ kontraŭleĝa ligno kaj lignoproduktoj tutmonde.

Cetere, por ĉieaj koncernatoj promesi kaj/aŭ partopreni grandskalajn, ekologie kaj sociale respondecajn rearbarigajn penojn.

Aranĝoj intencitaj sub la Mekanismo por Pura Evoluigo estu zorge ekzamenataj de la komunumoj dependaj de arbaroj por ilia pluekzisto, kiam ni vidas, ke ili preferas jam gravan terenekprenon kaj la detruon de siaj vivmanieroj.

Ĉe Rio 20, ni alvokas registarojn promesi konkretan kaj sistemecan subtenon kaj antaŭenigon de multkoncernate administritaj arbar-atestadaj sistemoj, en ĉiuj partoj de la mondo, kun aparta emfazo pri tropikaj plubarbaroj.

CDE: daŭrigebla agrokultivado

Plej laste en 2030, la tutmonda agrokultiva produktado estu transformita de industria al daŭrigebla. Kemiaj enigoj, herbicidoj, kaj insekticidoj estu plejgrandparte anstataŭigitaj de organikaj kaj biologiaj alternativoj. Izolitaj naturaj lokoj estu protektitaj kaj restarigitaj kiel fontoj de polenado, regado de damaĝantaj organismoj kaj grundo fekundeco. Nutraĵo por eksporto estu duaranga kompare al nutraĵo por loka konsumado. Kultivitaj planto specioj estu diversaj, same kiel produktadaj teknikoj kaj la gamo da agrokultivaj produktistoj. Plej bonaj administradaj praktikoj reduktu erozion per 90% kaj nitrogendefluon per almenaŭ 50%. Loka ekologia scio de indiĝenaj gentoj, tradiciaj, kaj lokaj komunumoj estu uzataj por identigi fortikajn kultivaĵojn kaj kultivadajn metodojn, kiuj estigas maksimuman protekton kontraŭ klimatsanĝiĝo.

Tiu celo ankaŭ inkluzivu daŭrigeblajn kaj homnutrajn sistemojn, kiuj provizas sanan nutraĵon por sufiĉi al aktualaj nutrobezonoj dume daŭrigante sanajn ekologiajn sistemojn, kultivistan fortikecon, kaj certigi bonan bestan sanon kaj bonfarton, kiu povas ankaŭ provizi nutraĵon por estontaj generacioj kun minimuma negativa efiko al la medio, per ekologiaj agrokultivaj sistemoj. Ni konsideras la rajton konservi siajn proprajn semojn kiel gravan punkton por agrokultivado.

Daŭrigebla kaj humana nutrosistemo antaŭenigu nutran suverenecon de komunumoj, sinpovigon al etskalaj nutraĵoproduktistoj en nutraĵa kaj agrokultiva estrado, kaj ankaŭ kuraĝigu lokajn produktadajn kaj disdonadajn infrastrukturojn kun egalaj ŝancoj por viraj kaj inaj kultivistoj, kaj la gravan rolon de junularo en ĉi tiu kampo, kaj igu nutrориĉan manĝaĵon havebla, alirebla, kaj malaltecosta por ĉiuj, samtempe provizante daŭrigeblan vivtenon al produktistoj per la pago de justaj prezoj por iliaj produktoj. Daŭrigeblaj nutrosistemoj estu bazitaj sur nutrada suvereneco kaj la rajto por etskalaj farmistoj, virinaj grupoj kaj lokaj komunumoj planti kaj interŝanĝi siajn semojn kaj kundividi sian scion.

Donu fortan kaj pliiĝantan subtenon al et-skala agrokultivado, produktado de sanaj nutraĵoj per celata esplorado, kromaj servoj kaj ebligadaj kondiĉoj, kaj laŭeble vegetaraj dietoj, kaj al certigo de virinaj rajtoj pri posedaĵoj kaj heredaĵoj.

Agnosku kaj subtenu per ĉiuj ebloj la gravan rolon kaj specialajn bezonojn de virinoj kiel la primaraj produktantoj kaj aĉetantoj de nutraĵo, kune kun la efektiviĝo de virinaj rajtoj pri posedaĵoj kaj heredaĵoj.

CDE: Verdaj urboj

Plej laste en 2030, urboj estu evoluigintaj kaj estu efektivigintaj planoj pri transportado, publika sano kaj ekologiaj bezonoj laŭ harmonia kaj integra maniero. Plej laste en 2030, de la lokaj al naciaj, registaraj politikoj faciligu kompaktan, miksitajn, piedirada-orientitajn, urban evoluigon, kiu minimumigu energiuon kaj maksimumigu loĝdoman sanon kaj kiu reflektas la koncepton de socio por ĉiuj aĝoj. Ĉiuj novaj konstruaĵoj plenumu verdajn konstruaĵajn normojn plej laste en 2030. Plej laste en 2030, urbotransportadaj bezonoj estu aŭ restu plejparte plenumataj de amastransporto, piedirado kaj biciklado. Vivokvalito ankaŭ estu plibonigita por loĝantoj plej laste en 2030, ebligante aliron al verdaj konstruaĵoj kun urbaj tegmentoĝardenoj, pura akvo, pura energio, sistemoj por mastrumi malpurigitajn akvon kaj daŭrigebla transporto. Plej laste en 2030, urbaj areoj kun grava (ŝtormakva malpuriga) inundo-risko reduktu netralasivan surfacan areon per 30% sub la niveloj de 2012 (por enlasi pli da akvon en la subgrundon).

CDE: Subvencioj kaj investoj

Plej laste en 2020, konsekvence kun la Strategia Plano por Biologia Diverseco, malutilaj instigoj, inkluzivantaj subvenciojn por produktado de fosilia bruligaĵo, nedaŭrigebla agrokultivado, fiŝkaptadaj kaj arbaraj praktikoj, kaj tiuj malutilaj al biologia diverseco, estu eliminitaj, estu stadie nuligitaj aŭ redirektitaj por antaŭenigi renovigeblan energion, daŭrigeblajn praktikojn kaj konservadan kaj daŭrigeblan uzon de biologia diverseco. Plej laste en 2015, registaroj devontigu sin al minimuma investo de 2% de la Malneta Enlanda Produkto (MEP), ĉiujare por faciligi la transiron al verda ekonomio, enkalkulante naciajn soci-ekonomiajn kondiĉojn.

CDE: Novaj indikiloj pri progresoj

Plej laste en 2020, nacioj suplementu aŭ anstataŭigu MEPon per nova mezurilo de daŭrigebla ekonomia bonfarto sur bazo de la plej bonaj tiutempe haveblaj informoj. Rendimento de la ekonomio kaj la prognozataj efikoj de politikŝanĝoj estu mezurataj per tiu nova mezurilo. Ni instigas procedon de daŭra plibonigo kaj perfektigo de la nova mezurilo post iom da tempo kaj internacian procedon por fiksi normojn kaj disponigi komunajn metodojn kaj donitaĵajn fontojn. Ni ankaŭ instigas la adopton de kelkaj aliaj ĉefaj indikiloj pri ekologia, ekonomia, sociala, kultura kaj lingva daŭrigebleco por provizi mezuron pri progreso de la transiro al verda ekonomio, kia civitana partoprenado, plibonigita bonfarto kaj atingoj de celoj de daŭrigebla evoluigo.

CDE: Aliro al informoj

Plej laste en 2022, registaroj aprobu kaj efektivigu leĝojn pri libera informado donantajn al la publiko la rajton akiri precizajn kaj verajn informojn, kiujn havas ilia registaro, precipe pri la medio. Registaroj aktive disponigu al ĉiuj koncernatoj utilajn, precizajn kaj verajn bone diskonigatajn donitaĵojn kaj informojn en konvenaj formatoj kaj lingvoj, ankaŭ per interreto. Tiuj leĝoj inkluzivu protekton al denunciintoj kaj

etendiĝu al sciigo de informoj per kompanioj.

CDE: Publika partopreno

Plej laste en 2022, registaroj certigu, ke voluntarismo kaj civitana engaĝiĝo estu enkadritaj en ĉiuj tutmondaj, naciaj kaj lokaj agoplanoj por efektiviĝo de daŭrigebla evoluigo kaj homa bonfarto, devontigu sin estigi medion ebligantan civitanan engaĝiĝon kaj volontulan agadon, kaj inkluzivu devigan publikan partoprenadon en (a) aproboj de ĉefaj evoluigaj projektoj kaj proceduroj pri efikoj je la ekologia impliko, (b) redaktadoj de nacinivelaj daŭrigeblaj evoluigaj politikoj, leĝoj kaj reguloj kaj (c) administraciaj decidoj, kia poluad-permeso.

CDE: Aliro al reĝustigoj kaj rimedoj

Plej laste en 2022 registaroj adoptu kaj efektiviĝu leĝojn certigantajn efikan aliron al juĝaj kaj administraciaj agoj pri daŭrigebla evoluigo, inkluzivante reĝustigojn kaj jurajn rimedojn. Precipe, ili certigu, ke la kostoj de juraj agadoj estas akcepteblaj kaj pageblaj por koncernatoj, kaj ke aliro al tiaj agadoj eblas per vastigo de jura statuso kaj aliaj rimedoj por interesataj homoj kaj organizaĵoj.

CDE: Ekologia justeco por la malriĉuloj kaj margenuloj

Plej laste en 2022, registaroj adoptu leĝojn, kiuj devontigas ŝtatagentejojn estigi konvenajn aranĝojn por doni informojn kaj engaĝi malriĉajn homojn, virinojn kaj aliajn malfavoratajn grupojn, kiam ili faras decidojn pri daŭrigebla evoluigo.

CDE: Baza sano

Plej laste en 2015 por subteni atingon la Jarmilajn Evoluigajn Celojn pri sano, kaj por kontribui al sano, bonfarto kaj daŭrigebla evoluigo, certigo de universala aliro al sanzorgoj kaj sanservoj, kie ajn eblas, senpage en la uzloko por virinoj kaj infanoj, kaj inkluzive de seksa kaj reprodukta sano, kaj sekve plifortigi la rezisteblon de homoj kaj komunumoj al la sekvoj de klimatsanĝiĝo kaj ekologia degenerado.

Ni alvokas registarojn faciligi daŭrigeblajn sansistemojn kiel nemalhaveblan kondiĉon por daŭrigebla evoluigo de socioj per provizo de esencaj sanservoj, antaŭenigo de sanaj vivstiloj, kaj produktado de transsektoraj publikaj sanpolitikoj.

Ni aprobas la finigon de tutmonda hidrargo-traktato plej laste en Februaro 2013, kiu malcedeme limigu la tutmondan uzadon kaj komercadon de hidrargo kaj reduktu la tutmondajn hidrargajn eligaĵojn.

Ni rekomendas malpermeson eksporti hidrargon kaj ties elfosigon por eksporto kaj sekurigon de la interkonsento per klor-alkalaj kaj elfosaj kompanioj ne komerci hidrargon kaj akcepti la respondecon certigi ĝian sekuran manipulado.

Ni rekomendas la estigon de novaj partnerecoj pri respondeca liverado de krudmaterialoj por produktado kaj la reguligo de specifaj malutilaj kemiaĵoj.

Ni alvokas por la plia fortigo de la Monda Organizaĵo pri Sano en ĉi tiu procedo.

Ni alvokas registarojn trakti socialajn determinilojn pri sano kiel rimedon por redukti tutmonde malegalecojn pri sano konsciiĝante, ke ĉiuj politikoj influas sanon. Egaleco rilate sanon gravegas por daŭrigeblaj socioj.

Ni alvokas registarojn fari senperajn kaj laŭtemajn intervenojn por plibonigi la sanon de junuloj certigante ties rolon kiel ŝanĝantoj por daŭrigebla socio, kaj certigi la evoluigon de financaj mekanismoj por sansistemoj.

Ni bonvenigas la agnoskon de la laboro de la programo de Volontulo de Unuiĝintaj Nacioj kiel la fokusa temo por plua traktado post la Internacia Jaro de Volontuloj, kaj petas, ke ĝi plu altigu konscion pri la kontribuo de volontulismo al daŭrigebla evoluigo, agi kiel kunveniganto pri la temo por la diversaj interesataj koncernatoj, disponigi retumilojn kaj referencajn rimedojn kaj provizi teknikajn kunlaboron al evolulandoj, je ilia peto.

Ni alvokas la Unuiĝintajn Naciojn per sia regula buĝeta procedo kaj mekanismoj ebligi al la Departemento de Komunikadoj kaj Publikaj Informoj gastigi ĉi tiun ĉiujaran Konferencon kaj provizi ĝin per konstantaj kaj antaŭvideblaj financaj kaj homaj rimedoj, kiuj necesas por agi tiele.

Ni dankas la homojn kaj la registaron de Germanujo kaj la urbon kaj urbestron de Bonno por ilia elkora bonvenigo kaj por la gastigado de la 64a ĉiujara konferenco de la Departemento de Publika Informo por Ne-Registaraj Organizaĵoj.

----- fino de la dokumento A/66/750 -----

Tradukita el la angla originalo en Esperanton far Leo Cooman kaj Manfred Westermayer.

Jen la retejo kie trovighas la dokumento en la 6 oficialaj lingvoj de la UN:
<http://www.un.org/wcm/content/site/ngoconference/resources/final>

Glosaro:

et-karbona = "vivmaniero au agado kiu kausas plejble malgrandan eligon da karbondioksido"

(angle: low-carbon ..)

proced(ad)o = procezo (evitenda), sinsekvo de fenomenoj (-ad- por substreki longdaŭran prodecon)

"Delivering as One" = iniciativo de UN 2005 proponante unuecan kunlaboron rilate daŭropovan evoluigon (vidu: en.wikipedia.org)

Akronimoj

anglaj akronimoj (,klarigo) = klarigo en Esperanto, akronimo en Esperanto

CSR, Corporate Social Responsibility = firmaa ekologia kaj socia respondeco

COP10, tenth Conference of Parties about Convention of Biological Diversity
10a Konferenco de Koncernatoj pri Biologia Diverseco

DPI, Department of Public Information = UNa Departemento de Komunikadoj kaj

Publikaj Informoj (DPI)

EEZ, Exclusive Economic Zone = Ekskluziva Ekonomia Zono (EEZ)
en la UN legharo pri la maro, do kutime ghis 200 maraj mejloj for de la bordo.

FPIC, Free Prior and Informed Consent (United Nations Declaration on the Rights of Indigenous Peoples adopted in 2007) = Libera Antaŭinformita Konsento (kiu rilatas al al UN Deklaracio de 2007 pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj)

GHG, GreenHous Gases = forcejgasoj

GDP, Gross Domestic Product = Malneta Enlanda Produkto, MEP

IYV+10 = deka Internacia Jaro de Volontuloj

ICPD = Internacia Konferenco pri Loĝantaro kaj Evoluigo, IKLE

JPOI, Johannesburg Plan of Implementation recognizes the New Partnership for Africa's Development as providing a framework for sustainable development on the continent = Johannesburg Plano de Efektivigo

MDG = Jarmilaj Evoluigaj Celoj de UN, JEC

NGO, Non-governmental organizations = Ne-Registaraj Organizaĵoj, NRO
dum tiu konferenco virino (supozeble el azia lando) proponis eviti la "Non" sed diri
pozitive:

Civil-Sociaj Organizaĵoj, CSO

REDD, Reducing Emissions from Deforestation and Land Degradation = Redukti
Eligojn el Senarbarigo kaj Malplibonigo de Grundo, RESM

SDG , Sustainable Development Goals = Celoj de Daŭrigebla Evoluigo, CDE

UNCED = UN Konferenco pri Medio kaj Evoluo 1992 en Rio de Janeiro

UNDP = UN Disvolva Programo, eo: UNDP (? en la teksto ciam temas pri evoluigo ..., sed ...)

UNEP = UN Ekologia Programo, eo: UNEP

UN DPI = Departemento de Publika Informo

UN programo por pli efika (sama) helpo al pluraj landoj (2005), undg.org

USPFI, Universal Social protection Floor Initiative = Iniciativo de la Universala Kunveno por Sociala Protekto.